



SALUTON!

Bulletin of the Esperanto Society of Chicago/Bulteno de la Esperanto-Societo de Chicago

1 Decembro 2000

Editor/Redaktoro: Les Kordylewski

Postal address/Adreso:
The Esperanto Society of Chicago/
Esperanto Societo de Chicago
P.O. Box 64896
Chicago, IL 60664-0896
(773) 271-8673
FAX: (773) 561-6582

Directors/Estraro:

Prezidanto – Humberto Perez
Vicprezidanto – Gertrude Novak, MD
Eduka Komitato – Kent Jones
5048 N. Marine Drive, D6;
Chicago, IL 60640
Tel: 773 - 271 - 8673
FAX: 773 - 561-6582
e-mail KentJones9@aol.com

At our meeting on 22 November the new officers were elected:

Secretary, Christopher Zervic
Treasurer, Charles Gunn
Board members, Roberto Michaelotto,
Walter Cebulski.

Dues/Membrokotizoj:

Sustaining Member, \$40/yr.;
Family, \$30; Regular, \$20;
Student or low income, \$10.
Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of our Society. Check should be payable to:
The Esperanto Society of Chicago, and mailed to our
Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607

Poŝtkesto

Write to us! Jon Willarson picks up mail from our mailbox before each meeting. Li daŭre kolektos la poŝtaĵojn venantajn al nia adreso. Bonvolu skribi al ni!

ZAMENHOFA BANKEDO

You are cordially invited to our annual banquet meeting which will take place December 9th at the

Staropolska Restaurant
5247 W. Belmont
773-736-5230

Arrive around 12:30 PM to renew old acquaintances and make new ones. Food will be available smorgasbord style at about 1 PM. The meeting will last until about 3 PM. The new officers will be installed, and an interesting program will be presented.

Make your reservations by contacting **Dr. Walter Cebulski, 773-775-1072.**

The cost will be \$11. One may pay him upon arrival, but he should have your commitment at least 3 days in advance. The restaurant can accept last minute guests, but they can best serve us if they know how many are coming 3 days in advance.

Unu el programeroj estos la prezentado de Valentina Cancina. Ŝi venis al Usono el Rumanio, kaj ĉeestis multajn esperantistajn aranĝojn en Eŭropo. Ŝi rakontos iomete pri siaj spertoj, kaj kantos por ni. Ni petos ĉiujn partoprenantojn paroleti.

Anoj kiuj ne povos veni al la bankedo bonvolu sendi mesaĝojn rete aŭ papere al Kent Jones por legado dum la bankedo.

Kent Jones, 773-271-8673, kentjones9@aol.com
5048 N. Marine Drive, D6, Chicago 60640

MEETINGS/KUNVENOJ

Our monthly meetings are held at the **Sulzer Public Library in Chicago, 4455 N. Lincoln.** Please join us for informal conversation or presentation.

Meetings begin at **7 PM** in the South Conference Room, first floor. The dates of the meetings in the year 2001 will be announced later.

Library of the Society/Societa Biblioteko

La loko de nia Biblioteko estas la salono de la apartamento de **Kent Jones, 5048 N. Marine, D6**. Nia kolekto havas eble 300 esperantlingvajn librojn, diversajn periodaĵojn, vidbendojn, kaj librojn en la angla pri lingvaj temoj. Vi rajtas uzi nian komputilon por sendi/ricevi retajn mesaĝojn, tajpi leterojn, ktp.

Societanoj kaj gastoj ĉiam estas bonvenaj. Nur telefonu Kent iom antaŭ via vizito: **773-271-8673**.

Agado de Kent

Kent Jones kept protesting the FAA's refusal to launch language research, every Thursday starting 29 June 2000, 10 - 11 AM, at the Federal Plaza in Chicago. Raportisto por la antaŭurba ĵurnalo DAILY HERALD telefone intervjuis Kent Jones pri la aviada lingvo-problemo.

Algebra Lernolibro

Nia projekto traduki tiun lernolibron daŭras. Tiu kiu deziras partopreni, bonvolu kontakti Kent Jones.

Pri la Membroj

Eva Harrison naskis gemelajn bebinojn Rebecca kaj Anna la 25an de Marto 2000. Ili estis malpezaj, do restis dum unu monato en la hospitalo. Nun ili ĝuas la hejman vivadon.

La artikolo de Gregory Dolgin MISS OF CHICAGO aperas en LITOVA STELO, januaro 2000, p. 15.

NI GRATULAS

Christopher Zervic, sekretario kaj eksprezidanto de la societo diplomiĝis de la advokaternejo John Marshall januaron 2000. Junion 2000 li eklaboris ĉxe la advokatifirmao de John Z. Huang, kaj nun estas advokato pri enmigrado kaj ĝeneralaj juraj aferoj. La fianĉino de Chris, Laura, estas ankaŭ advokato, pri reklama juro. La duopo translogxiĝos al la Avondale-kvartalo, en konstruata vicdomo, proksima al la Belmont-metrohaltejo blulinia.

Christopher Zervic, having passed bar exams, now has entered practice.

His office address is:

John Z. Huang & Associates

20 N. Clark Ste 1700

Chicago

312-759-8500

Parolataj cxi tie estas la angla, ĉina kaj internacia.

INTERŜANGXO DE NOVAĴLETEROJ

"Novaĵoj Tamtamas", eldonata de Jokohama Esperanto-Rondo kaj "SFERILO" el San Francisco atingas nin regule. Ni ankaŭ ricevas "La Semanto"-n de Esperanto Societo de Miŝigano. Dankon al la sendantoj!

KARDINALO GEORGE KAJ ESPERANTO

Dum sia senlaca aktivado, Kent Jones havis la okazon renkonti kaj interparoleti kun Kardinalo George. La Kardinalo konstatis ke la Internacia Lingvo ne estas fremda al li. Li aŭdis pri Esperanto en sia junaĝo.

ESPERANTO HELPAS VOJAĜI

Du gefrancoj, Rachel Prual, 24-jara instruistino, kaj David Cholet, studento, estonta instruisto, komencis dujaran vojaĝon ĉirkaŭ la mondo kun dorsosako. Ilia vojaĝrimedo estos petveturado.

La ideo lerni Esperanton venis al ili antaŭ nelonge pro la spertoj akiritaj de Maryvonne kaj Bruno Robineau kiuj vojaĝis 8 jarojn ĉirkau la mondo, kaj de Gudule Le Pichon kaj Laurent Cuenot, kiuj vojaĝas nun ĉirkaŭ Eŭropo kun ilia filineto Lola per ĉevale tiritita rulhejmo.

Ili deziras viziti lernejojn, gelnantojn (instruado ja ege interesas ilin !) kaj povos interrilatigi ilin kun francaj lernejoj per Interreto. Gravas ke Esperanto montriĝu la ĉefa lingvo de perado de informoj kaj interŝanĝoj. Ili forte deziras subteni Esperanton, sed tio dependas ankaŭ de la esperantistoj mem en la landoj kiujn ili vizitos. La elektitaj dato, horo kaj loko de la foriro estis la 15a de julio, la 15a horo, ĉe la trafikplaco "Rond-point du Dr Zamenhof" de la franca urbo Roche-sur-Yon. Ili unue iris petveturite al sudfranca urbo Toulouse por atingi Tel-Aviv aviadile. Dum la Universala Kongreso ili esperis kapti multe da kontaktoj kun esperantistoj el la landoj kiujn ili vizitos. Ili intencas viziti kvardekon da landoj ĝis junio 2002: Israelo, Egiptio, Jordanio, Sirio, Turkio, Irano, Pakistano, Ĉinio, Tibeto, Nepalo, Hindio, Bangladeŝo, Mjanmaro, Laoso, Vjetnamo, Malajzio, Indonezio, Aŭstralio, Ĉilio, Bolivio, Brazilo, Peruo, Ekvadoro, Kolombio, Panamo, Kostariko, Nikaragvo, Honduraso, Gvatemalo, Meksikio, Usono, Sudafriko, Madagaskaro, Mozambiko, Tanzanio, Kenio, Senegalio, Malio, Mauritania, Maroko, Hispanio kaj reveno al Francio. Ilia TTT-ejo <http://mondepouce.ctw.net> enhavas ankaŭ Esperanto-paĝon en kiu ili prezentas sin mem kaj sian projekton. Ili estas kaj estos kontakteblaj per jena retadreso : turistoj@hotmail.com

UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

http://www.esperanto.net/info/index_en.html

<http://www.esperanto.com>

<http://www.esperanto-usa.org/>
ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;
toll free: 1-800-ESPERANTO (1-800-377-3726)

<http://www.uea.org>
UEA – The Universal Esperanto Association

<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>
Free Esperanto Course on Internet

<http://www.esperanto.org/espeviva/angla>
Esperanto Viva - A free online course

<http://esperantic.org>
Esperantic Studies Foundation

<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>
Pasporta Servo

<http://lps.uniroma3.it/eler>
Esperanto en lernejoj

<http://www.alcyone.com/max/links/esperanto.html>

<http://esperanto-ecommerce.com/>

ttt.esperanto.org

www.esperanto.hu/kalendar.html

www.bert.com/~donn/Esperanto/literaturo/literaturo.html

<http://dictionaries.travelang.com/English/Esperanto>

<http://dmozorg/World/Esperanto/>

www.esperanto.se/virtuala/gazetoj.html

wwtios.cs.utwente.nl/esperanto/hypercourse

<http://osiek.org/aera/en.html>
AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format

VIZITO DE Yvonne van der HORK

Lunde, la 5an de junio, aperis ĉe O'Hare la atendata aventurema Esperantista biciklistino, Yvonne van den Hork, kun sia biciklo en granda kesto. La aventuro tuj komenciĝis: kiel transporti ŝin, biciklon, kaj keston al la apartamento de la gastiganto, Gertrude Novak? Iom da meditado kaj imagpovo solvis la problemon. La biciklo, kun la apartigita antaŭa rado, estis en la aŭto, kaj la platigita, malplena kartona kesto estis ŝnurligita sur la tegmento de la auxo. Tra la vespera trafiko ili finfine alvenis senprobleme ĉe la loĝejo. Dum tri tagoj nia gastino bicikle esploris la ĉikagan lagbordon kaj urbocentron. Ŝi ankaŭ preparis siajn aferojn por sia kuraĝbezona longdistanca, sola bicikla vojaĝo. Ŝi planis iri trajne al Denver, tiam bicikle tra Montano, Idaho, Oregono, Kanado, Bostono, Oklahomo, Meksiko, dum la venontaj 12 monatoj. Malgranda Societa akcepto por ŝi okazis ĉe la apartamento de Kent Jones. S-ro Czuba donis al ŝi belegan kaptukon, sufiĉe malpezan por biciklisto. Gertrude fotis la aferon, same kiel aliajn partojn de la vizito de Yvonne, kaj alportis la fotojn al nia kunveno, la 29an de junio.

Vendrede estis necese ke Yvonne, biciklo, kaj kesto foriru de nia Union Station. Ŝi grimpis en la vagonon, kaj audiaŭis nin survoje al la usona Okcidento.

Poste ŝi loĝis en Denver en la loĝejo por junuloj de Ben Moore. Ŝi sendis belegan karton de Denver al Gertrude. Ben admiras kaj iom studas Esperanton. Dian Norby estas instruistino en Misoula, Montano. Yvonne vizitis Dian dum 3 tagoj, tiam forbiciklis. Yvonne sendis al ni la mesaĝon de Vankuvero, Kanado pri ŝiaj ĝisnunaj aventuroj. Telefone, ŝi diris ke la plejparto de ŝia veturado ne estis per biciklo, sed per petveturado. Surprize, ŝi diris ke la biciklo ne malhelpis ŝin akiri veturojn.

ALIAJ VIZITINTOJ

Alex kaj Monika Carcioti vizitis nin en junio. Ili estas anoj de Sao Paulo, Brazilo. Gesinjoroj Rabens gastigis ilin dum 5 tagoj. Gertrude Novak montris la vidindaĵojn al ili. Estis bela koincido, ĉar Gilbert Ledon kiu kunlaboras pri aviado kun Kent Jones loĝas en Sao Paulo ankaŭ.

Ionel Onet visited our Society on Saturday, 5 August, 7:30 -9 pm. at Kent's apartment. He is the worker at ELNA's office in California who fills orders for books and magazines. We enjoyed his Romanian sense of humor.

Amanda Higley is a young lecturer who visited us in Chicago. She arrived on a train from London, Ontario on October 20, and departed for St. Louis a week later. She had a talk on her international experiences at Shimer College in Waukegan on Saturday, October 21. Unfortunately, only a few students attended.

Amanda estas profesia vagulino kiu utiligas Pasportan Servon por vojaĝi internacie. Ŝi jam vizitis ĉirkaŭ 100 pasportservanojn, ĉefe en Eŭropo dum ŝia 10-monata vagado. Roberto Michaelletto gastigis ŝin en Chicago.

Dum la oktobra kunveno vizitis nin Tony Gravagno kun la edzino. Ili nun loĝas en Kalifornio, kie Tony havas sukcesan komputilan laboron.

REDAKTORO DE “Saluton !” SERĈATA

Ni daŭre serĉas volontulon por servi la taskojn de la Redaktoro de nia bulteno “Saluton”. La devoj konsistas el kolektado de publikindaj informoj kaj komputila kompilado de la tekstoj. Volontulo bonvolu anonci sin al Kent Jones, telefono: 773-271-8673, e-poŝto: kentjones9@aol.com